


# PONTO ☆

*Jaro 4 N-ro 2 (23a) Organo de Sunda Esperanto Agado aprilo. 2005*

## La 8-a SEA-kunveno

okazis la 12.3 2005 en Lund.
Ĉeestis: Anna-Maria Lange, Harry Engkvist, Ragnhild kaj Andreo Laskowski, Ingrid Malteson kaj Ulla Saether el Lund, Jytte Sunekaer kaj Arne Casper el Kopenhago, Ann-Louise Åkerlund (gvidis la kunsidon) kaj Barbro Haraldsson el Helsingborg, Per-Olov Johansson kaj Karin Lindquist (notis) el Malmö.

**1. Raportoj pri la pasinta periodo:**
**Helsingborg:** Ann-Louise rakontis ke ili ricevis novan lernanton kaj ke ili kolektis materialon, tradukis tiun kaj invitas nin al ekskurso al Sofiero dimanĉe la 12.6
.
**Kopenhago**: La klubo kune kun DEFA havas kursojn kaj prelegojn ĉiulunde.
Zita, diplomita ĉe-instruisto, volonte havos instrutaskon. La junulara organizo havis grandan aranĝon. Okazis ankaŭ intervjuo en la regiona radio.
**Lund:** La klubo partoprenis per informriĉa materialo en la aranĝo de la UN-Asocio de Lund. LEK estas membro de tiu asocio kaj rekomendas aliajn klubojn aktivi en tiu organizo. Japana lingvisto vizitis la klubon. Pli ol antaŭe homoj telefonas pri LEK kaj esperanto. Du novuloj aliĝis al la klubo ĉi-jare.

**Malmö:** Pro la 100-jara jubileo, en kiu KEM, SEF kaj DEA partoprenos en majo 2006, la klubo multe okupis/os sin pri tiu kongreso.

2. **Ponto**: Karin sciigis ke sur la agado.net programpaĝo estas eble enmeti novajn programerojn dum la eldonperiodoj de Ponto. Sendu tuj la informojn al ŝi kaj ŝi enmetas ilin kaj forprenas jam okazintajn programerojn.
Sten, pere de Karin, admonas membrojn informi neesperantistojn pri **agado.net** paĝo. Je specialaj okazoj eblas enmeti kromajn paĝojn en Ponto.

**3. Kursoj:** Semajnfina 3-taga kurso okazos en bieno en Selando.
Ĉiulunde okazas konversacia kurso en Malmö kaj ankaŭ ĉiulunde instrukurso en Kopenhago. Lund aranĝas konversacian rondon kaj komencis labori pri svedaj kaj afrikaj eminentuloj en alia rondo.
La paroliga kurso, kiun Ann-Louise gvidos, okazos la 16-an de oktobro en Malmö. Per-Olov kaj Karin respondecos pri tiu kurso.

4. **100-jara jubileo:** La laboro por la jubileo en Malmö progresas. La popolaltlernejo de Kvarnby, kiu havas lokon por ĉ.150 personoj, jam estas mendita. Ebla temo de la kongreso: Esperanto - lingvo por EU. Grupo komencis skribi la 100-jaran historion de KEM.

5. **Informlaboro:** Kopenhago invitas al labortago pri Ekstera informado la 17.4 inter 10-16-a h.
Aliĝu al kek@esperanto.dk – Kim Henriksen.



Kaŭze de la 200-jara jubileo de H.C. Andersen oni tradukas verkojn de li. La klubo celas partopreni en granda urba ”kultura nokto” la 7.10.

La biblioteko en Lund pozitive akceptis la esperantogazetojn - ekz. Literatura Foiro, Monato eventuale La Espero. En aŭgusto (eventuale 6/8) la katedralo en Lund havos koncerton, sekvota de ĉiĉerona rondiro. Informo rete pri la aranĝo.

6. **Eventuale:** Jytte kaj Karin partoprenos en la SEF-kongreso en Haninge.

**7. Venonta SEA-kunsido okazos en Malmö la 22-an de oktobro je la 11.00 h.**

Nästa **Ponto**, nr 3
utkommer ca 19/8
Skicka allt material till
*Karin Lindquist*
senast den 6.8

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/*redakta komitato:*
**Kontaktperson**: *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20
Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado),



ISSN 0907-127X

# La Folio ☆

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 76 N-ro 2 (691)* >>Ĉiam antaŭen<<

Fondita en 1906


**Unu-taga paroliga kurso por la SEA-regiono en Malmö**

**la 16-an de oktobro**

**inter la 10-16a horo**

*Partoprenu la kurson kaj parolu pli libere dum la jubilea kongreso venontjare!*
Gvidanto: Ann-Louise Åkerlund
Aliĝu al Karin tel. 040-98 01 20
aŭ Per-Olov tel. 040-26 31 94

## Jubilea kongresraporto

La preparoj pri la jubilea kongreso bone progresas. La elektita komitato kunsidis 4-foje por pritrakti la diversajn erojn en la aranĝo kaj dividis taskojn inter si.
Kontakto estas prenita kun Malmö Turism kaj Karin, Per-Olov kaj mi renkontis respondeculinon por ricevi konsilojn pri tio kiel plej efike kunlabori kun la urbo Malmö.
Dum la DEA-kongreso en Greve Karin kaj mi kunsidis kun la danoj por ricevi iliajn dezirojn kaj interkonsenti pri la ekonomiaj kondiĉoj pri la kongreso.
Komence de la aŭtuno ni pli serioze serĉos prelegantojn kaj distrantojn.
Viaj proponoj ĉiam estas bonvenaj!

Sten Svenonius prezidanto de la kongresa komitato

**TAGORDO 11.5**

1. Elekto de protokol-kontrolanto
2. Diskuto kaj decido pri aŭtunaj kursoj
3. Diskuto kaj decido pri aŭtunaj programeroj
4. Eventualaj demandoj


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☎ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius* *sten@agado.net*
☎ 040-19 14 77


## Okazos tutlande

**21- 22 majo**
**Sveda Esperanto-Federacio okazigos sian kongreson kaj jarkunsidon en Haninge** sabate de la 09.00 h ĝis dimanĉe la 14.00 h Prof. Hartmut Traunmüller prelegos sabate: "Lingvistiko ĉe la universitato de Stokholmo"
Dimanĉe estos podia diskuto: "Survoje al centjariĝo de SEF"
Vendrede antaŭ la kongreso estos "Malferma Tago" ĉe Esperanto-Centro, Vikingagatan 24

**10 -12 junio**
Morokulien, ĉe la landlimo inter Svedio kaj Norvegio okazos la **landa kongreso 2005 de Norvega Esperanto Asocio**

**27 junio - 2 julio**
En Esperanto-Domo en Lesjöfors la 27-an de junio ĝis la 2a de julio 2005 estas aranĝotaj **Internaciaj someraj kursoj de ESPERANTO**
Informo kaj aliĝo al Esperanto-Gården
SE-680 96 Lesjöfors, Svedio
Tel. +46(0)590-309 09
egarden@esperanto.se

**16 - 18 septembro**
**SEI-seminario (Sveda Esperanto-Instituto) en Lesjöfors, kunlabore kun Esperanto-Asocio de Finnlando**. Temo: "Esperanto en literaturo kaj muziko en Finnlando kaj Svedio". Inf. Lars Forsman, tel. +46-(0)586-54811, ret: larsespo@yahoo.se

La svedlingva 'PC FÖR ALLA' reklamas per grandegaj literoj
**'Lernu esperanton en 12 lecionoj'**
Sube oni trovas:
"Kurso de Esperanto"
www.cursodeesperanto

Raportis: Ingrid Näsholm

## Programeroj



23.2
Ĉar ne multaj partoprenantoj venis al la libroaŭkcio, parte pro la malbela vetero kaj parte pro tio ke ili jam havas la librojn, ni diskutas ĉu vendi la donacitajn librojn alimaniere, ekz. dum kunvenoj kaj festoj.

23.3.
**Prelego pri UEA**
*la hodiaŭa mondo de UEA* de ĝen.sekr. Ulla Luin (svedo) logis nin al Malmö. Ni ricevis densan liston kun la diversaj komitatan-kategorioj, observantoj kaj oficistoj en la Centra Oficejo. Ulla rakontis pri la taskoj de la unuopuloj – eĉ montris bildojn de kelkaj el ili. Pluraj estis ege laboremaj, inter alie la komitatanoj en Kubo kaj Japanio. Ili interrilatas kun la ĉirkaŭaj landoj. Estis efektiva maniero sciigi nin pri la laboro en UEA. *Partoprenintoj Arne Casper kaj Jytte Sunekær.*



6.04
**Anna-Maria Lange,** en sia vigla maniero instruis nin vidi la diferencon inter transitivaj kaj netransitivaj verboj. Ĉiuj partoprenantoj tre aktive kaj bonhumore partoprenis la "lecionon". Estis gaja maniero plibonigi sian gramatikan scion.

# Kontaktilo

***Membrogazeto de K.E.K***
***Konversacia Esperantista Klubo***
***Kopenhago***
N-ro 2 (661) 2005 69a-jaro




**Kutimaj horoj** en la klubo:

**Kafo/teo-trinkado 19.30 - 20.00.**
**Programoj 20.00 - 20.45 + 21.00 - 21.45.**

**Programo Vasbygade (DEFA/KEK)**

Kurso por komencantoj ĉiulunde 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45
Interreta aliro estas en la klubejo ĉiulunde, kaj eblas sendi kaj ricevi interretmesaĝojn al defakek@hotmail.com
Informu pri tiu adreso. Ni esperas, ke tio faciligos kontakton inter la kopenhagaj esperantistoj kaj la tuta mondo.
La unuan lundon de la monato ni kune vespermanĝas je 18.30 - kunportu mem viajn buterpanojn aŭ mendu ĉe Ruth, tel. 36 46 62 79.



**Pri kursoj - jen nia oferto**:

Kurso por komencantoj ĉiulunde 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45

Legogrupo:
Arne Casper estras legogrupon (temo: La fabeloj de H.C.Andersen) ĉiulunde 19.00-19.30 kaj 20.00-20.45

La kondiĉo por partopreni kurson aŭ legogrupon estas membreco de unu el tiuj kluboj: KEK, DEFA Kopenhago, DEJO. Parolu kun la du kasistoj, Karen Olsen (DEFA) kaj Egon Starup-Jensen (KEK).

Referato de la ĝeneralkunveno 14/2 2005:
A**. Oni elektis *Bent Wiinberg* kiel direktanton kaj *Bent Jensenius* kiel referanton.**
**B**.*Jytte Sunekær* voĉlegis duonpaĝan raporton.
Aldone al la raporto estis:
Ni havas nun 10 lernantojn – 5 komencantojn kaj 5 daŭrigantojn, kaj tio donas pli da membroj en la klubo. - La membrokotizo plialtiĝis al 180 kronoj jare – parte por la (kun)eldonado de la du gazetoj PONTO kaj Esperanto en Danio.
Meze en punkto b. klubano antaŭmetis plurajn proponojn. Tio fuŝigis grandan parton de la sekvonta kunveno. Alia klubano riproĉis la direktanton por ne haltigi la proponanton ĝustatempe, kaj baldaŭ aliaj klubanoj plendis, ke la riproĉanto uzis tro multe da tempo korekti la direktanton por ne ĝustatempe haltigi la proponanton.
**C**. La kasisto, Arne Casper, prezentis la kalkulaĵon por 2004 kun pluso de 2837,23 kronoj. En la stoko de obligacioj restas nur 1763 kronoj kaj baldaŭ ili finiĝas – parte tial la kotizplialtigo. - Ankaŭ la bonega vizito de Mikaelo Bronŝtein estis iom multekosta. - La svedoj bedaŭras la redukton de numeroj de Ponto. - Iu proponis ke venontjare oni listigas la librostokon kun la valoro de 1 krono.
**ĉ**. Oni aprobis fari ***Bodil Kühlmann*** honoran membron.
**d.** Jytte jam funkciis 8 jarojn kiel prezidanto kaj nun ŝi volas retiriĝi. Ŝi restas kiel konsultanto al la nova prezidanto Kim J. Henriksen, kiu estis la nura kandidato. - Kim diris, ke li ne povas veni ĉiujn lundojn sed li deziras labori por ke ni estus pli konataj kaj videblaj en la urbo. Samtempe li sentis ke estas granda honoro, ĉar la klubo historie estis kaj estas lia klubo.
**E**. Du novaj membroj de la estraro: *Egon Starup-Jensen* kaj *Jytte Sunekær*.
**F.** Estis tri kandidatoj kiel anstataŭanto, tial oni devis voĉdoni. La rezulto: *Ana* 10, *Ileana* 6 kaj *Zita* 6. Lote *Zita Carbaraviciene* estis elektita anstataŭanto.
g. *Bent Wiinberg* estis elektita revizoro (kune kun Aleksander Kogan).
**G.** *Jens S. Larsen* estis elektita revizora anstataŭanto. *Simon Sund Petersen* reelektiĝis.
h. Jytte dankis Bent Wiinberg por la 4-jara periodo. Tre ofte li mem prizorgis la programojn. Jens estris 2 jarojn. Li fidele kopiadis PONTON por ni. Ambaŭ plurfoje protokolis.
Kunlaboro kun la svedoj en Lund la 12an de marto.
Kim: la junuloj vizitos diversajn gimnasiojn por varbi pri Eo. -
Finfine la direktanto dankis por preskaŭ bona ordo.

## La nova estraro de KEK

**Prezidanto**
Kim J. Henriksen
Hallandsgade 6, 4.
2300 Kbh. S.
Tlf: 32 54 93 54
kek@esperanto.dk

**Vicprezidanto**
Jytte Sunekær
Højlundshusene 16
3500 Værløse
Tlf: 44 48 47 26
jytte.sunekaer@mail.tele.dk

**Sekretario**
Bent Jensenius
Højstrupvej 124
2700 Brønshøj
Tel: 38 60 15 86
bentjensenius@sol.dk


**Kasisto**
Egon Starup-Jensen
Godthåbsvænget 31, 2.th.
2000 Frederiksberg
Tlf: 26 25 60 29
es-j31@webspeed.dk

**Membro**
Arne Casper
Bryggervangen0, 4. tv.
2100 København Ø
Tlf 21 40 84 87
arne-casper@email.dk

**Anstataŭanto**
Ana Røssum
Brunevang 30,
2700 Brønshøj
Tlf: 44 92 10 83
croessum@post2tele.dk

**Anstataŭanto**
Zita Carbaraviciene
Ny Kongensgade 18
1557 København V

Legu pri Bodil Kühlmann, la honora membro de KEK - pago 6 !



## Klubo Esperantista de Helsingborgo

**Saluton!**

Printempo alvenis dum Pasko, kaj ni ĉiuj ĝojas. Mi nur mallonge resumos kio restas de nia agado, planita por tiu ĉi semestro.

La studgrupo ĉe Barbro daŭros dum aprilo kaj majo. La lasta kunveno estos la 25-an de majo. Se vi hazarde ŝatus partopreni, anonci vin ĉe Barbro, tel 042-12 14 71.

Nia venonta klubkunveno okazos dimanĉe la 29-an de majo. Ankaŭ se vi volas partopreni tiun kunvenon, ni petas vin telefoni antaŭe. Eble ni ŝanĝos la lokon.

**Ekskurso al Sofiero**

2005 estas jubilea jaro. Antaŭ 100 jaroj la nove edzigita princo Gustav Adolf kaj lia edzino Margareta venis al Sofiero kaj komencis transformi la neglektitan ĝardenon al unu el la plej famaj en Svedio.



Dum la malferma sezono, kiuj komenciĝas la 16-an de aprilo, okazos pluraj aranĝoj. En la palaco oni montros kiamaniere la reĝa familio loĝis kaj vivis, kaj en la ĝardeno estos rekonstruita parton de la ĝardeno de princino Margareta.

Ni invitas vin partopreni ekskurson al Sofiero dimanĉon la 12-an de junio. Mi proponas, ke ni renkontiĝu ĉe la enirejo proksimume je la 12-a horo. Aŭtobuso numero 219 (Pendeln Landskrona-Höganäs) havas haltejojn en Knutpunkten kaj apud Sofiero. Laŭ la nuna horaro ĝi foriras de Knutpunkten je la 11.50-a horo kaj alvenas al Sofiero je la 12.03-a horo. Povas esti ke tiu horaro estos ŝanĝita, ĉar ĝi validas nur ĝis la 11-a de junio. Do, se vi intencas partopreni mi konsilas al vi telefone anonci vin. Mia hejma numero estas 042-29 12 62 kaj en la oficejo 042-18 66 39.
Kunportu piknikon kaj plejdon aŭ simile. La kosto eniri la parkon estos 70 kronoj, se ni inkluzivas la palacon 80 kronoj. Se ni estos pli ol 10 personoj ni havos ambaŭ por 70 kr. La parko estos malfermita inter la 10-a kaj la 18-a horo, la palaco kaj la kafejo ĝis la 17-a horo.

Bonvenon ĝui la komencon de la someraj ferioj en la bela parko de Sofiero!



Ann-Louise

---

## La Esperanto klubo de Lund

**Saluton LEK-anoj!**

Unue pri klubkunvenoj: la 10an de februaro AML prezentis la verkistinon Elieshi Lema, Tanzanio. Nova iniciato estis interpreti la prelegon, en kio ĉiuj ĉeestantoj partoprenis. La 10an de marto ni havis jarkunvenon. Ĉiuj estraranoj estis reelektitaj. Dum 2004 la kluba agado bone funkciis. Tamen, LEK tro malmulte aktivis eksterklube. Ĉu vi havas proponojn al plibonigo de tiu grava manko? Aliflanke, homoj pli ofte informiĝas telefone, ĉefe sekve de interretaj sciigoj pri esperanto kaj LEK.

Okazis informvespero por studentoj. Bedaŭrinde ne eblis interkonsenti pri studhoraro, konvena por ĉiuj.
Revigliĝis niaj kontaktoj kun Montendre Esperanto-Grupo, Francio, kaj el Tanzanio venis raportoj pri sukcesa seminario por kurs-gvidantoj. Iniciatinto estis nia amiko Mulele Mbassa, Bunda, kiu kune kun Ambrose Polle gvidis la instruadon.
Ni decidis apogi proponon de A. Polle pri aĉeto kaj vendo de arakidoj (per 300 SEK).

Al nia "libro" pri svedaj kaj afrikaj famuloj aldoniĝis Dag Hammarskjöld kaj Wangari Maathei (Kenjo).
Se Ambrose akceptas la peton, li prezentos Julius Nyerere.



Estis agrable aranĝi la ĉi-printempan SEA-kunvenon en Lund en marto.
Tiam estis proponite aranĝi renkontiĝon en Lund, iam aŭtune, lige kun la kutima sabata orgenkoncerto en la katedralo kun posta ĉiĉeronado de André Laskowski.
Eblas pruntepreni La Hirundon, Literaturan Foiron kaj Monaton ĉe AML.
Nia kasisto raportis pri aliĝo de tri novaj membroj, nome Inga-Lena Wallgren, Martin Gingmar kaj Lars Carlén. Koran bonvenon al LEK!
Atenton: ĉu vi pagis vian membrokotizon por 2005? (Samaj kotizoj kiel 2004.)

Fine, ĉi-jare nia klubo havas 75-jaran datrevenon! Ankaŭ al tiu evento ni revenu aŭtune.

Ĝis la,
Anna-Maria Lange

Bildo: La Giganto Finn
en la katedralo de Lund
tie la orgenkoncerto okazos aŭtune

| | | |
|---|---|---|
| Merkrede 27.04<br>Dimanĉe 29.04 | KEM, Malmö<br>KEH, Helsingborg | Miksita printempa programo kiu laborigos niajn cerbojn |
| Lunde 02.05 | KEK/DEFA, Kph | H.C. Andersen- la laboroj en la klubo rilate al la naskiĝtago. Birthe Traerup kontribuos per prezento de la libro |
| Lunde 12.05 | LEK, Lund | Gaja festado pro naskiĝtagoj - jam pasintaj kaj aktualaj. Vidbendo pri kristnaska festo |
| Lunde 16.05 | KEK/DEFA, Kph | Pro pentekosto neniu kunveno |
| Lu/Dim. 20- | Sv Esperantoförbundet | Jarkongreso de Sveda Esperanto Asocio, Haninge, |
| Lunde 23.05 | KEK/DEFA, Kph | Unuaj impresoj pri la 58a Fervojista Kongreso |
| Merkrede 25.05 | KEH, Helsingborg | Kunveno. Anoncu vin al Barbro tel. 042-12 14 71 |
| Merkrede 28.05 | KEM, Malmö | Föreningarnas Dag, Gustav Adolfs torg, inter 11-16.a |
| Dimanĉe 29.05 | KEH, Helsingborg | Klubkunveno. Anoncu vin al Barbro tel. 042-12 14 71 |
| Lunde 30.05 | KEK/DEFA, Kph | Jytte raportos pri la sveda jarkongreso en Haninge (sude de Stockholm) la 20-22an de majo |
| Lunde 06-06 | KEK/DEFA, Kph | Zita rakontos pri la esperantomovado en Litovio |
| Dimanĉe 12-06 | LEK, Lund | Ekskurso al Svarte kun pikniko. Pliaj detaloj ĉe A-M L |
| Dimance 12.06 | KEH, Helsingborg | Ekskurso al Sofiero. Pliaj informoj sur paĝo 4 |
| Lunde 13-06 | KEK/DEFA, Kph | Olof kaj Daniel rakontos pri la projekto ”La Loko, kiu celas igi esperanton pli ’trendy’ - per televidprogramoj, vestaĵoj, modernaj ekspozicioj, |
| Lunde 20.06 | KEK/DEFA, Kph | Ni somerstudos - por ne TUTE ferii de la studgrupoj ni traktos elektitajn ĉapitrojn de Faktoj kaj Fantazioj. |
| Lunde 27.06 | KEK/DEFA, Kph | Eugeniusz: 20 min. pri ’simboloj, signoj, himno’ |
| Lunde 04.07 | KEK/DEFA , Kph | Egon rakontos: La mia esperantista vivo |
| Lunde 11.07 | KEK/DEFA, Kph | Ni somerstudos - por ne TUTE ferii de la studgrupoj ni traktos elektitajn ĉapitrojn de Faktoj kaj Fantazioj. |
| Lunde 16.07 | KEK/DEFA, Kph | Somerekskurso al Köge. Ni renkontiĝos en Köge station (ĉe la antaŭa fino de la kajoj) je 10.00 h. Foriro de Kph per S-trajno linio E 09, 16, foriro de Naestved per trajno 0922. Ni vizitos Kjöge Miniby, kaj poste ni iros al Diget 2, kie loĝas Erik,por manĝi la kunportitan |
| Lunde 18-07 | KEK/DEFA, Kph | Karen distros per taskoj pri la naturo |
| Lunde 25.07 | KEK/DEFA, Kph | Ni somerstudos… Vidu 20.06 |
| Lunde 01.08 | KEK/DEFA, Kph | Partoprenintoj donos impresojn post UK en Vilnius |
| Lunde 08.08 | KEK/DEFA, Kph | Jan rakontos pri INNOTRANS kaj KAEST - du fervojrilataj |
| Lunde 15.08 | KEK/DEFA, Kph | Blindaj esperantistoj rakontos |
| **Rigardu** | *Agado.net* | **Estas eble enmeti novajn programerojn.** |

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

**Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.**
La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

**La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.**
Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h. en la ejo de nia studorganizo SENSUS, Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange,
Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt,
allan.ljungstedt@telia.com

**Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.**
La kunvenoj okazos je la 14-a horo en Faktorsgatan 5.
Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund
tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe Barbro Haraldsson tel. 042-121471

*Hejmpaĝo de SEA www.agado.net*

**Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.**
Kunvenas en la ejo de DEFA. Vidu la informojn tie. Prezidanto: Kim J. Henriksen, tel. 0045-32 54 93 54. Rete: kek@esperanto.dk

**Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG**
Aranĝoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport, salono n-ro 1, dua etaĝo.
Pordoj malfermitaj 19.00-23.00. Ĉiu prelego okazos ĉ. 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al Torben Svendsen, Vanløse Alle 57,
DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
Persone al la kontaktulo de KEKG:
Torben Svendsen: esperanto@webspeed.dk
Al la asocio - KEKG: kulturgrupo@webspeed

**Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA**
Kunvenas lundojn inter 19.30-22.00 en Banedanmark, entreprise, Vasbygade 10.
Por eniri: uzu la sonorilon ĉe la (krd)pordo.
Kontaktulo: Lene Niemann,
tel. 0045-49 26 13 19
Rete: niemann@mail.dk
Kluba retadreso: defakek@hotmail.com

## Gratulon Bodil Kühlmann, honora membro en KEK!

### – jen prezento de aktiva esperantovivo:

***Instruis*** Esperanton de 1944 kelkajn jarojn, eĉ 4 fojojn semajne sub militaj ĉirkonstancoj
***UK-aranĝanto***. Unue la postkongreso de la 33-a Universala Esperanto Kongreso en Malmö 1948 okazis en Kopenhago, same la UK-oj 1956 kaj 1975.
***Karavanvojaĝojn*** al UK-oj, aranĝanto.
***Gastigis*** plurajn eksterlandanojn.
***Dan-Svedaj Tagoj***. Ek de 1946 – 1990 kunlabore kun la svedoj okazis tuttaga ekskurso ĉiujare dimanĉon en septembro – alterne en Danio kaj en Svedio.
***Komunkomitatano***, gvidanto dum multaj jaroj. Ĉefe la alia parto estis LEA, la tiama laborista sekcio el la dana movado. Poste alvenis DEFA, la faka fervojista grupo – kaj LIBE, la blinduloj.
***Libroservo***, prizorganto 1944 dum 7 jaroj.
***Esperanto-Domo Fonduso***, fondinto, fizike funkcianta en E-Domo, Rosenørnsallé 44 1986 - 1999. De tiam oni klopodis trovi lokon. Luitajn lokojn la fonduso pagis – je petoj.
La ***biblioteko*** de KEK, prizorganto dum jardekoj.
***E-ekspozicion***, aranĝis en 1946 grandan. En 1949 la klubo havis pli ol 200 membrojn.
***Voĉlegis songazeton*** el revuoj - ĉiumonate ĉe la blindulinstituto dum multaj jaroj ĝis 1994, kiam ŝi trovis alian prizorganton.

Ĉio estis farita kune kun la edzo, Gustav Kühlmann, gvidanto dum kunvenoj, havis taskojn en UEA, tradukis inter alie artikolon pri la vivo de H.C.Andersen – laŭ peto de la ministerio pri eksteraj aferoj – por diskonigo en la tuta mondo. - Ilia filino esperantiĝis. La infankongreson en 1956 ŝi partoprenis. Lizeta tradukis Koranen – laŭ peto de Torben Kehlet. Plej laste ni povas esti dankemaj pro la 50-jara jubilea libro pri KEK, kiun Gustav iniciatis kunlabore kun Margrethe Noll, kiu verkis la unuan parton.